

La Suda Kraco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-roj 26-27 (Duobla Numero.

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Septembro, 1922.

The Fourth Australasian Esperanto Congress, Sydney, Easter, 1923.

The Council of the A.E.A. has decided that the fourth Australasian Congress shall be held in Sydney during Eastertide, 1923. Sydney has many attractions at this period of the year, and those visitors who can spend more time there than is taken up by the congress meetings will easily find pleasant recreation.

The following congress committee has been appointed:—Miss E. Lee, Miss A. Hughes, Miss M. Freely, Messrs. J. Jolliffe, P. J. Bennett, and Dodd, with Mr. F. V. Taylor, Treasurer, and Mr. Leslie E. Fosto, Secretary and Organiser. The committee intends to do all in its power to make the congress a special event and worthy of Australasian Esperantists. To realise this aim funds, necessary, and groups, samid oj and sympathisers are urged to collect and send donations and congress fees as early as possible, and so facilitate the work of the committee. The fees fixed are, for Sydney £1/1/-, for country, In New Zealand members, 10/-. All communications must be addressed to the Secretary, Mr. L. E. Fosto, Clissold Parade, Campsie, N.S.W.

Dr. Privat in Liverpool.

The Liverpool Esperantists induced Dr. Privat to visit their city during his stay in England. A public meeting was arranged with a view to attracting to our movement the sympathies of the local union of the League of Nations and of the Universities. The meeting took place on the 6th July at the University. Professor W. E. Collinson presided, and spoke of the significant international conference which he had recently attended in Geneva in connection with Esperanto in schools. This opening speech immediately caught the attention of non-Esperantists, who became eager to hear Dr. Privat. His incomparable eloquence in Esperanto was on this occasion quite eclipsed by his speech in English, of which he is equally master. By good arguments and convincing phrases he showed the necessity of Esperanto for the new post-war organisation—the League of Nations, and its eminent fitness also as a world language. Many professors from the University were present, among them Professor Webster, an enthusiastic supporter of the League of Nations. In proposing a vote of thanks to Dr. Privat he said that he came to the meeting as a sceptic, but would go away quite convinced of the fitness of Esperanto as an auxiliary world language in

general, and in particular as a medium of intercommunication by the League. Dr. Privat and Prof. Collins on the following day visited the Directory of Education, where they made a good impression and received encouraging promises relating to the teaching of Esperanto in schools.

State Schools' Exhibition.

This exhibition, which will be held in Melbourne from the 27th September until the 14th October, will be held to celebrate the fiftieth anniversary of free education by the State, which was introduced into Victoria in 1872. Previous exhibitions have been held, but this one will be more extensive than any of its predecessors. The whole of the Exhibition building, including the Aquarium, has been secured. Every branch of school work will be shown—kindergarten, primary, higher and technical. There will be demonstrations of manual and technical training. The machinery used in connection with the latter will be shown in operation. The exhibition will be open daily from 11 a.m. till 10 p.m., concerts forming the evening programmes. Displays of physical training exercises will be held in the Melbourne Cricket Ground. Many children from remote country districts will visit Melbourne as guests of Melbourne householders, and it is anticipated that more than 1000 teachers will be in daily attendance. The School Committee has kindly granted space for the exhibition of anything pertaining to Esperanto. This is a splendid opportunity of placing the merits of Esperanto before the members of the teaching profession, and it is to be hoped that it will be fully utilised. The committee dealing with the Esperanto section is headed by Mr. Gilbert Wallace, Education Dept., Melbourne. Anything striking or novel relating to Esperanto, together with suggestions generally as to the utilisation of the space available, should be sent to Mr. Wallace at once.

Specialaj studoj faritaj de P-ro R. Chudeau ŝajnas pruvi ke en tre antikvaj tempoj la dezerto Sahara estis sulkigita per multaj riveroj, kiuj faciligis la rilatojn inter Sudo kaj Nordo.

La Kvara Skolta Leg'o.

Tiu kiu amplekse esploris la kaŭzojn de la pasintaj internaciaj, naciaj, polemikoj kaj diferencoj sendube venas al la konkludo ke plej multaj okazoj la ĉefa kaŭzo estis ĉiam la manko de toleremo, kunligita kun la malkompreno de la vidpunkto de la alia flanko: aŭ, en unu vorto, la manko de la spirito de Frateco.

Speciale al la Esperantistaro tiu kaŭzo estas tute komprenebla, tial tio, kion mi skribas nun devas interesi ilin.

La fondinto de la Skolta Movado Sir Baden-Powell, klare komprenis ke se la popoloj de la Mondo iam vivos en "sankta harmonio" oni devas eduki la nunajn generaciojn en la spiriton de frateco. Plene kompreninte la signifon de tiu fakto, la saĝe bazis la Skoltan Movadon sur la spirito de frateco kaj la Brita kvara skolta leĝo tial diras ke "Skolto estas frato de ĉiu alia skolto, ne gravas al kiu socia grado la alia apartenas."

En la edukado de knaboskolto tiu kvara leĝo ludas tre gravan rolon kaj preskaŭ ĉiuj skoltaj praktikoj celas admoninstrui tiun spiriton de frateco.

Por skolto estas sia devo esti frato al ĉiu alia knabo sed kiam li renkontas skolton el alia fremda lando tiu evidentiĝas la lingvo-malfacilaĵo kaj eniras sian kapon la penso "kiel mi povas esti frato al mia fremda fratskolto se mi ne scias paroli liajn lingvon?" Se tiu renkontito estas Franco eble la Brita skolto (ekzemple) scias paroli la francan lingvon sed kiam li renkontas skoltojn el Francujo, Hispanujo, Rusujo, ktp., li nur povas paroli kun kaj kompreni tiujn kiuj parolas la anglan aŭ francan lingvojn. Kiam tiam en lia simpla maniero li ekkomprenas la neceson de komuna helpolingvo.

Jen, miaj geamikoj, gesamideanoj, estas frukto-promesa grundo kie devus esti kulturita de vi.

Starigis antaŭ tri jaroj, en Londono, la Skolta Esperantista Ligokies Propaganda Fakestro la verkinto de ĉi tiu artikolo estas. En tre multaj landoj ni difinis Naciajn Agentojn kaj nia ĉefa celo estas la disvastigado de Esperanto inter la geknaboskolto de la Mondo. Mi estas preta kunlabori kun ĉiuj kiuj povas helpi.

al ni. Ni bezonas spertajn Esperantistojn en ĉiuj partoj de la Mondo kiuj estas pretaj starigi klasojn por agnaboskoltoj. La Estroj de trupoj ne serĉos por instruantoj ĝuste pro tio ke ili jam havas sufiĉan laboron por fari en aliaj direktoj tamen mi estas certa ke ili volonte permesus eksterulojn instrui siajn trupojn pri Esperanto. Se mia ĉi-supra sugesto allogas vin bonvole skribu al mi por pludiskuti la aferon kaj aranĝi detalojn. Mi povas konatigi al vi miajn Naciajn Agentojn kiuj helpas al vi laŭeble. La nacia agento por Aŭstralio estas: Rotestro Kerreto Davidson, "Hopewood," Mary street, Auburn, N.S.W. Mi plezure donos pluajn detalojn pri nia Ligo al ĉiuj, kiuj volas reciproke helpi al ni kaj al Esperanto Movado. Jen mia adreso: 527, Lea Bridge Road, Leyton, Londono, E.10, Anglujo. J. W. Leslie, Propaganda Faktestro, S.E.L.

Tristan Da Cunha.

De G. D. Kvarnstrom.

Mi bone konas ĉi tiun insulon. En la jaro 1909, kiam pereis la ŝipo Waratah, mi estis unu el la maristoj serĉantaj postsignojn de tiu malfeliĉa ŝipo. Dum nia marvagado ni trifoje vizitis la insulon Tristan da Cunha kaj traserĉis ĝin kaj ĝiajn marbordojn por ia ebla postsigno de la malaperinta ŝipo. Ni trovis nenion; sed amikiĝis kun la enloĝantoj, kaj mi tute ne povas subteni la opinion de la verkisto de artikolo, "La Hejmo," kiun vi presigis en la julia "Suda Kruc." La insulanoj tute ne estas malfeliĉaj! Iliaj "malfeliĉegoj" kaj "senigadoj" ne estas tiel severaj, kiel tiuj de multaj aŭstralianoj aŭ de multaj loĝantoj en aliaj landoj. Ofte mi pensas pri la tagoj kiam mi restis ĉe Tristan da Cunha, kaj multfoje, laciĝinte pro mia laboro, mi envias ĉi tiun popolon, kaj mi tute kunsentas kun ilia decido neniam forlasi la insulon. Ilia lingvo estas nur malbela miksaĵo el multaj, sed ilia sintenado kaj konduto estas vere modelaj. Gentilaj sen humileco ili rigardas ĉiun kiel egalan al si mem, sed ne plu. Ili estas justaj sen leĝo, malkleraj tamen saĝaj, fortaj, sanaj, realaj homoj en reala mondo, ilia propra; ili havas homajn kulpojn sen malvirtoj. Fratoj, amikoj, kunuloj, ĉiuj el ili. Tiaj mi trovis la loĝantojn sur Tristan da Cunha.

Recenzo.

Ekzilo, de Aleksy Rzewski, el Pola lingvo tradukita de K. Domoslawski, eldonis Laborista Librejo, Wspolna 17, Varsovio, prezo 0.50 svisaj frankoj.

La libreto priskribas la travivaĵojn de la aŭtoro, ekzilita el Polujo de 1905 ĝis la fino de la granda milito. La antaŭparolo de la tradukinto diras, —

— El tiu tempo devenas la "rememoroj." Eble laŭ arta vidpunkto ili havas mankojn: ilia aŭtoro ja ne estas stilisto, kaj nur malofte prenas plumon en la manon, estante antaŭ ĉio homo de ago. Tamen ili estas gravaj, kiel historiaj dokumentoj, transdonitaj al ni de homo, kiu ne nur rigardadis la estintecon, sed mem ĝin kreis. Ilia rakonto estas viva kaj interesa.

Kiam sekve de postmilitaj okazintaĵoj, sendependa Polujo fariĝis realaĵo, Rzewski unue ekaperas kiel komisario de la revolucia registaro de Moraĉevski, kaj baldaŭ poste en sia hejma urbo Lodz, ĉefurbo de pola laboristaro, li estas elektita je urbestro, laŭ la nova demokrata leĝo.

Sur tiu ĉi posteno li laboras senlace jam preskaŭ tri jarojn en plej malfacilaj kondiĉoj. Vidante la teruran malklerecon de la loĝantaro, kiu disvastiĝis sub fremda regado, li ĉiujn siajn fortojn direktis al tiu ĉi demando. Nun ĉiuj infanoj en Lodz ricevadas jam lernejan instruon: sukceso, kiu nenie aliloke estas atingita en tiu ĉi parto de Polujo.

Ankaŭ ni esperantistoj ŝuldas al li multon. Homo progresema, li bone komprenas la signifon de internacia lingvo por la proksimiĝo de la popoloj, apogas nian movadon, kaj mem estas esperantisto, kvankam liaj multflankaj okupoj ne permesas al li sin persone dediĉi al la disvastigo de nia afero.—(C.W.B.).

La Eksperimento de Eccles, kun notoj pri la instrumentado de Elizabeth Hogg. Eldonis la Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, Londono. Prezo 10p. aŭ 4 respondokuponoj.

Pro tio, ke la grava kongreso de instruistoj nun okupas la atenton de samideanoj, estas tre interese kaj instrue legi tiun ĉi libreton pri la bone konata eksperimento de 1916, per kiu oni instruis en Eccles, Anglujo, Esperanton al 200 infanoj 13-14 jaraĵ

dum ses monatoj, tiel ke ili povis uzi ĝin flue, bone, kaj tion faris propre vole dum siaj ludoj, kiam la influo de la lernejo ne devigis tion.

En konciza antaŭparolo, s-ro Page rakontas la ĉefajn faktojn pri la eksperimento, la lernintoj, kaj la rezultoj. Fraŭlino Hogg, kiu estis unu el la instruistinoj elmontras en tiu ĉi libro sian metodon, kiu tiel bonege sukcesis, ke ne konvenas al ni aŭ aprobi aŭ malaprobi ĝin; sed estas permesite mallonge diri ĝian praktikajn partojn.

La programo de laboro konsistas el dek du lecionoj en kiuj trovas lokon skribaj kaj parolaj ekzercoj; la gramatikon, sufiksojn, kaj prefiksojn oni enkondukas laŭgrade, kaj la diversaj ludoj certigas, ke la lernantoj ofte elparolu tion, kion ili scias.

Multaj kluboj esperantaj trovās, ke tia ekzerco tre helpus ilin, ĉar estas tre malfacile alie venki la memkonscion de nespertaj lernantoj; ĉi tie ili havas trezoregon de bonaj kaj praktikaj ludoj. Sed tio ne estas la sola bono de la libro, kies ĉefa merito estas, ke ĝi donas modelon tiel utilon, kiel sendefektan, por instruistoj de Esperanto al infanoj.—(B.C.B.).

The Esperanto Teacher, by Helen Fryer, Eldonis la Brita Esperantista Asocio, Londono. Prezo 1s 2d, aŭ 6 respondkuponoj.

Tiu ĉi lernolibro por personoj kiuj ne tre bone scias la gramatikon estas ideala instruilo por kluboj kaj samideanoj instruantaj nian lingvon al ordinaraj homoj kiuj eksentas deziron lerni ĝin. La libro klarigas la elparolon, la signifon de la diversaj parolpartoj, kaj la regulojn; ankaŭ ĝi enhavas bonajn vortarojn kaj ekzercojn grade aranĝitajn. Multaj esperantistoj jam konas ĉi tiun lernolibron, multon lerninte el ĝi; kaj ĝi restas tre helpema amiko por ĉiuj lernontoj.—(B.C.B.).

Devoj de la Homo, de Giuseppe Mazzini, el la itala lingvo tradukis Mikaelo Arabeno. Eldonis la Laborista Esperanto-Grupo, Genova. Prezo ne montrita.

La aŭtoro de ĉi tiu libro, Giuseppe Mazzini, restos por ĉiam en la historio de Italujo kiel unu el la plej fervoraj patriotoj kiuj laboris por la unueco de la patrujo. Kiam li estis nur junulo lia malavareco kaj la bonfarema alteco de lia spirito karigis

lin al liaj kunuloj; kaj fariĝinte paŝo aĝa li sentis por laboristoj "gefloro de la popolo" koran simpatian. Li bonigis ilian situacion, kaj unuigis la patrujon fariĝis lia granda celo, pro kiu li suferis multon-persekutadon kaj malliberecon.

En la "Devoj de la Homo" li provas eduki la laboristaron, klarigante al ili, ke ili havas ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn, kaj ke vera libereco ne estas anarĥio, sed stato en kiu ĉiuj devoj kaj rajtoj estas difinitaj.

En la estanteco estas tre bone, ke tiu ĉi doktrino disvastiĝu per Esperanto, sed malfeliĉe la jena traduko estas difektita per uzo de malgustaj vortoj kaj gramatikaj eraroj.—(B.C.B.).

First Steps in Esperanto. Facila lernolibro de Esperanto por infanoj kaj komencantoj anglalingvaj, verkita de Montagu C. Butler, Sekretario de la Brita Esperantista Asocio. Prezo 9 pencoj, fleksebla tolo, 1 ŝilingo. Ricevebla ĉe la B.E.A., 17 Hart Street, London, W.C.1.

Estas nun multaj libroj per kiuj Angloj povas lerni Esperanton, kaj estas eble vidi en ili multajn kaj malsamajn metodojn. La jena libro estas verkita laŭ maniero tute nekutima. Ĉio estas grade aranĝita; eĉ la alfabeton oni ne instruas unupecu, kaj enestas multnombraj ekzemploj esperantaj kaj anglaj, por klarigi la diversajn punktojn, kune kun ekzercoj elparolaj kaj tradukaj, kaj mallongaj legaĵoj. Komence, la ekzercoj kaj ekzemploj enhavas vortojn tre similajn al la anglaj; la unua paŝo, kiu ĉiam estas malfacila, estas tiamaniere ne tre granda. La libro estas ankoraŭ alia aldono al la lernolibro, kaj sendube estas personala por kiuj ĝi montriĝos, post provo, esti la plej konvena el ĉiuj.—(B.C.B.).

Dua Kursa Legolibro, kompilita de W. M. Page, F.B.E.A. Londono. Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, W.C.1. Prezo 10 pencoj.

La kompilinto de ĉi tiu libro celas provizi por lernantoj konvenajn legaĵojn, kiun ili povus uzi laŭ sia progreso je la ekzercoj de lernolibro. Li bone sukcesis kaj la enhavataj anekdotoj kaj humoraĵoj estas samtempe agrablaj kaj helpemaj laŭ vidpunkto gramatika kaj vorta.—(B.C.B.).

Esperanto in Twelve Lessons.
Londono, Brita Esperantista Asocio.
Tiu ĉi libro similas al tiuj verkitaj
laŭ la ordinara kaj tradicia maniero.
Komence troviĝas resumo de la
lingvo, reguloj, prefiksoj kaj sufiksoj;
tiam sekvas dek du lecionoj, kun vor-
tareto, ekzerco kaj traduko por ĉiu,
kaj fine estas dek du esperantaj
legajoj ankaŭ kun tradukoj. Ĉio
estas montrita tre klare kaj simple,
la libro estas precipe bona por lernan-
toj kursanaj.—(B.C.B.).

George Williams. Ricevebla ĉe 3,
rue General Dufour, Genevo, Svis-
lando; prezo, 1 fr. svisa.

Ĉar cent jaroj jam estas forpasintaj
de la nasko de unu el la ĉefaj inicia-
toroj de la Kristanaj Asocioj de Junaj
Viroj, George Williams, oni eldonis
esperante historion de lia vivo, re-
sumon de pli granda verko kiu aperis
en 1906. Ĉi tiu libro enhavas 52
paĝojn, estas bone presita kaj donas
tre interesan scion pri Asocio kiu
havas anojn en multaj landoj.—
(B.C.B.).

Here and There.

Swedish newspapers have lately
devoted considerable space to Esper-
anto. Reports of the Geneva Con-
ference of Teachers appeared in 15
daily papers, while in one week more
than 40 articles and notices regard-
ing Esperanto were published. The
social democrat paper of Gothenberg
said in a leading article: "Those who
till now had little or no faith in Es-
peranto as the world language of the
future must have noted with surprise
the considered opinions of the
(Teachers') congress."

The first Esperanto Congress of
Estland was held in April at Tartu.
The reports submitted showed that
there was a gratifying activity
throughout the country. An Esper-
anto Association of Estland was
formed.

M. Fernand Doceul, ex-colonial ad-
ministrator in Indo-China, has sent
to the French Minister for Public
Instruction and to the members of
the interparliamentary commercial
conference a petition seeking recogni-
tion of Esperanto.

Esperanto is making steady pro-
gress in Lithuania. In Telsiai it is
studied by 150 pupils of the local
high school, and in the seminary at
Gizai 19 of the students have formed

a group. In six other towns new
groups have been started, three of
which have arranged to take classes
in the local high schools.

The "Brazilian Esperantist" men-
tions groups in 15 towns. The out-
standing feature of these reports is
the growing interest taken in Esper-
anto by teachers.

The Chamber of Commerce, Avi-
gnon, France, in June last decided to
inaugurate a free class for the in-
struction of Esperanto.

At the Bordeaux Fair 300 Esper-
anto Grammars were sold during one
day.

The Esperanto section of the Paris
Fair (10--25 May) was a great suc-
cess. Eight hundred text books were
sold and thousands of propagandiloj
were distributed. The President of
the Chamber of Commerce and the
President of the Fair Committee
visited the stand.

The Orleans group successfully
organised an Esperanto booth during
the local fair (9--18 June).

A meeting of the local Esperanto
associations was held in Vienna on
8th May, when it was recorded that
they desired the Sixteenth Universal
Esperanto Congress to be held in that
city during the summer of 1924. The
Standing Committee of Congresses
has already been notified of the re-
solution. The congress committee
states that they are already assured
of the support of the civic authorities
and public institutions. It is gene-
rally thought that the Fifteenth
Congress will be held in Warsaw
next year. Reports from the Four-
teenth Congress will soon be avail-
able, and will convey the decision
there arrived at.

The Venetian Esperantists met in
the council room of the Town Hall
on 23rd April. The mayor in an en-
thusiastic speech congratulated the
group on its activity. He publicly
promised moral and material help.

Three classes are now being held
in Fiume.

"I am convinced that through
Esperanto the mutual understanding
among all nations can be obtained
and the true happiness of human-
kind can be realised." This is a
message to the American Esperanto
Association from Mr. Juichi Shimo-

mura, Councillor and Secretary to the Department of Education of Japan, who, with his colleagues, has recently been visiting the schools and educational institutions of Boston. He also called on the Esperanto authorities to learn what progress the movement was making in America.

A class at the Minnesota University has aroused a great deal of interest. Dr. Lehman Wendell gave three illustrated lectures during one month.

As there are many workers in Montreal who do not know either English or French, they intend to use Esperanto.

The Radio Relay League, Hartford, Conn., recently applied to the American Esperanto Association for information regarding the language, as it will probably soon have to be used in communicating with the amateurs of Europe.

Mr. E. J. Nally, president of the U.S.A. wireless interests, is in favour of Esperanto for "broadcasting" speeches, news and songs.

Prof. A. Christen says that wireless will compel the world to learn Esperanto.

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, maja; Bulletin De S. Francaise P.E., maja; Brazila Esperantisto, marta-aprila; Esperanto Triumfonta, n-roj 89, 90, (la solaj ricevitaj depost aprilo!); Esperanto Finnlando, aprila, maja; Espero Katolika, maja; Esperanto-Praktiko, Dresden A.1, Struvestrate, 40, maja-junia; France Esperanto, maja, junio; Katolika Mondo, n-roj 9, 10; Katolika Revuo, feb.-mar.; Libero, junio; Litova Stelo, mar.-jun.; La Semisto, mar.-apr.; L'Esperanto, mar., apr., maja; Le Monde Esperantiste, mar.-apr.; La Espero, eldona societo esperanta, Stockholm 1, monate, sv. kr. 4.50, apr., maja; Nova Euro, (kun Ĉekoslovaka gazeto kaj Fervoja Esperantisto), junio; Sennacieca Revuo, maja, junio; Skandinava Esperantisto, Skandinava Esperanto - Instituto, monate, maja, la unua eldono post kvin jara dormado; Verda Utopio, maja; Victoria Education Gazette, julia, — repesis angle la "Manifesto al Instruistoj"; Teristo, Ĉe S. Szabuniewicz, poŝkesto 663, Moskvo, monate, eksterlanda abono 8/-, n-ro 1, maja.

Thirteenth British Esperanto Congress.

This Congress was held in London from the 2nd to 6th June. The weather was perfect, and about 500 of the 550 subscribers participated in the various meetings. Dr. Edmond Privat, who is at the moment perhaps the outstanding personality of our movement, was the principal speaker at the propaganda meeting; but there were other visitors present, including representatives of France and Holland, while Australia was represented by S-ro Hudson. The preliminaries were disposed of on Friday, and on Saturday at 2.30 a public meeting was held in the Queen's Hall. The chairman was Dr. Kimmins, formerly chief inspector of Schools under the London County Council. He said he was convinced of the very pressing need of an international auxiliary language. What had impressed him in his inspection of classes in Esperanto was the extreme interest taken in the subject and the very rapid progress made by the students. Dr. Privat, who was received with great applause by the 800 people present, spoke for an hour in English. He said that before the war Esperanto was an experiment: now it was a fact. He thought Esperanto would become widespread after a generation of school children had learnt the language, for they would naturally use it as delegates to international congresses and the League of Nations. He explained the structure of Esperanto, and said that it is the cream of all languages, and its simplicity appealed to all. Professor Bovet learnt it in four days, and made a speech in it without notes at the recent Conference of Teachers. He thought that the League of Nations would recommend that school children be taught Esperanto. England was the strongest advocate for peace, and if the English showed that they did not desire to force the English language on the rest of the world, but were favourable to Esperanto, the world would soon accept it. At the conclusion of his address he was applauded for several minutes.

S-ro F. R. Shelton, the Editor of the "British Esperantist," said that Esperanto was spreading in England in a remarkable manner. There were in England between eleven and

twelve thousand active group members, 120 associated groups, 100 independent groups, and six federations. In Great Britain 13,500 New Testaments, 36,800 dictionaries and 5000 novels had been sold. During the last year 2000 copies of the Life of Zamenhof and 365,000 small instruction books had been disposed of. The London City Council favours Esperanto. Fully 50,000 people in England now have a knowledge of the language.

Dr. Privat then addressed the meeting in Esperanto, and pointed out that if Esperanto did not succeed now, it would be the fault of the British, for now England had a chance to push the movement forward. We must work for Esperanto, a movement for the good of which one could give his all. He considered it so worthy that he would prefer to die for it than for his country, because he thought it the more important. Esperantists must not wait for government action, but continue their efforts, which would result in such progress that the various governments would be ready to give their official support. Space is lacking for a fuller report of the congress, which was most successful, and included great propaganda meetings in Hyde Park, a trip on the Thames to Richmond, a visit to Parliament House, a meeting of the U.E.A., a concert by blind entertainers, and a grand Fancy Dress Ball.

Universitata Grupo.

Fondigis Esperanta Fakso sub la protektorato de "Landa Nacia Turul Asocio" de Hungaraj Universitatoj kaj Ĉeflernejoj, kies celo estas la disvastigo kaj intensa kulturo de la lingvo Esperanta sub la signo de la hungara nacia spirito. Ĝi intencas kunligi kun la studentaro de la tuta mondo, fari grandan studentpropagandon, precipe koncerne la studentosociajn demandojn kaj la interŝanĝojn de studentoj. Samtempe komenciĝis kurso esperanta.

Esperantistaj universitatanoj kaj universitataj grupoj estas petataj interrilati kun Ludoviko Totscheestro de Esperanta Fakso de la "Turul" Asocio. Budapeŝt, W. Szerb utca 10.1.5. Hungary.

Kroniko.

Sidnejo, N.S.K.—La klubo plivigliĝis kaj entuziasme komencis la penadojn pri organizado de la Aŭstralia IVA kongreso, kiu okazos en Sidnejo dum venonta Pasko. La societo dankas s-ro W. J. Lawrence, kiu konstante kaj senlace laboris maŝinskribante dokumentojn.

Ashfield, N.S.K.—Rondeto kunvenas sub gvidado de s-ro L. E. Fosto ĉiun merkredon.

Melburno, V.—S-ro R. Rawson malfermis kurson ĉe la Aŭstralia Preĝejo. Dek ses personoj partoprenas.

Northcote, V.—S-ro G. Redfern lekciis pri Esperanto antaŭ la loko filio de la A.N.A. Ĉeestis kvardek personoj. La esperanta grupo en Northcote nun enhavas 25 membrojn.

Middle Park, V.—Ĉi tieaj membroj de la A.N.A. interesiĝis. Dek du nun studas esperanton.

North Melbourne, V.—S-ro G. Redfern ankaŭ parolis al la ĉi tieaj membroj de la A.N.A. Laŭ li la "ideo alkreĉiĝas."

Albert Park, V.—Junulara grupo, kiun instruas f-ino Robson, nun havas lokon en la domo de f-ino King, aleo Viktoria. La plej aĝa el la sep lernantoj havas dek ses jarojn.

Sandringham, V.—La grupo sub gvido de f-ino Hollow, kunvenas ĉiusemajne. Du ŝtatlernejaj instruistoj partoprenas.

Melburno, V.—La Melburna Klubo Esperanta trovis novan, pli grandan, kunvenejon en salono de la konstruejo de la Aŭstralia preĝejo, 19 strato Russell. La unua kunveno tie okazos merkredon, la 13an de septembro. En la sama halo, la "Australian Church Guild" kunvenas ĉiun semajnon je 6.45 ĝis 7.45 vespere por studi Esperanton. F-ino Cummings, s-ro G. Hussey kaj s-ro R. Rawson instruas 26 lernantojn.

La Asocio de oficistoj en Sparkasa Banko ŝtata serĉis informon pri Esperanto, kaj poste 12 geoficistoj fondis grupon, kiu kunvenadas ĉiun merkredon, je la sesa. La kunveno estas 212 strato Swanston, kaj s-ro R. Rawson instruas. Interese estas noti, ke ĉi tiu estas la unua kurso inter la ĉi tieaj komercistoj.

Kelkaj samideanoj forgesis renovigi sian abonon. Ili tion faru kiel eble plej baldaŭ, ĉar ni ne povas presigi la gazeton sen mono.

Bindkravato.

“Kravatojn, kiujn vi portas, tute al mi ne plaĉas,” diris iun tagon mia edzino. “Mi ĝojas, ke vi sur mi ne trovas pli grandajn mankojn. Sed kion cetere faris al vi miaj kravatoj?” “Ili ne estas modernaj. Ĉiu pli bonstata sinjoro portas nun bindkravatojn.” “Mi ne apartenas al pli bonstataj sinjoroj. Mi ne havas tiom multe da tempo kiel ili, por ke mi staru tutajn horojn antaŭ spegulo kaj aranĝadu bindkravaton.”

“Mi petas vin, ne diru, ke vi ne havas tempon vestigi vin iom laŭ modo. Ĉu vi devas ĉiam esti tiel malzorge vestita kiel ia ajn artisto?”

“Mi ĝojas, ke mi almenaŭ iom similas al famaj viroj.”

“Do, vi ne volas porti bindkravatojn?”

“Ne!”

“Nu, bone!”

Edzino komencis obstini. Miajn demandojn ŝi respondis tiel koncize, kvazaŭ ŝiaj vortoj estus el oro.

“Kio al vi okazis pro Dio?” mi fine demandis. “Vi tamen ne koleros je mi pro tiuj bindkravatoj! Per kolero vi malrektigas viajn belajn vangetojn, kredu, eĉ iomete tio al vi ne konvenas.”

“Ankaŭ al vi ne konvenas tiuj malnovaj kravatoj. — Kiel malgaje, se post dekokjara edzeco edzino ekkonas, ke viro ne edziĝis kun ŝi el amo.”

“Ke mi ne edziĝis kun vi el amo? Vi tamen eĉ ian dotaĵon ne havis. Jes, estas vero, mi ne edziĝis kun vi el amo — nur tiel pro amuzo.”

“Mi ne scias, kial vi kun mi edziĝis! ... El amo certe ne! ... Ho ve, se mi estus dekokjara kaj havus blondajn harojn, vi certe tuj plenumus mian deziron kaj aĉetus bindkravaton.”

Ŝi aludis tion, ke mi iam parolis pri mia amo al blondharulinoj.

“Trankviliĝu, kara edzineto! Eĉ se tion dezirus plej aminda — plej ĉarma blondulino, mi ne plenumus ŝian deziron.”

“Jes, ĉar vi ne estas sufiĉe delikatsentema. Virino dum tuta jaro beligas sin nur por edzo, sed li eĉ iomete ne penas, por ke li akiru plaĉon ĉe edzino.”

“Ne estas ĉiam tiel! Virino ja beligas sin dum tuta jaro, sed ne ĉiam por edzo. Plejgrandparte pro tio, por ke ŝi veku envion de aliaj

virinoj. Kaj dandoj de promenado — tiuj malplenaj marionetoj — beligas kaj ornamas sin nur pro tiuj virinoj, kiuj preferas larĝajn modmantelojn aŭ piedvestojn de amerikana fasono, antaŭ pli profunda animo en eluzita vesto.”

Virino ekridis. “Ne fieru nur tion pri via interna valoro.”

“Mi ne estas fiera, sed mi malamas ĉion nenaturan. Mi malamas frizaranĝitan kapon, pudritajn vangojn, aranĝitan barbon, mi malamas ĉiun, kiu bonodoras kiel tualeta sapo, kaj fine mi malamas ankaŭ bindkravatojn. Mi ne scias, kial mi devus per aranĝado de tiuj malbenaj bindkravatoj pasigi kvin minutojn, se mi por arango de miaj malnovaj papilioformaj kravatoj bezonas nur kvin sekundojn. Kaj nun mi petas vin, elpelu tiujn bindkravatojn el via obstina kapeto.”

“Se vi min, karulo, nur iomete amas, vi devas porti bindkravatojn.”

“Mi ne amas vin. Mi vin neniam amis. Vi mem tion tamen diris. Mi edziĝis kun vi nur tial — ĉar mi enuis. Iun tagon mi havis nenion gravan por fari — nu — kaj do mi edziĝis kun vi.”

Edzino ne respondis, sed ŝi komencis tuj min ataki. Mi ne amas familiajn malpacojn, mi malamas disputojn kaj kverelojn, sed nunfoje mi decidiĝis, ke mi ne cedos. Ne kaŝu ne! Ok tagojn ŝi superŝutis min per siaj malicaj kaj venenaj rimarkoj kiel per bomboj. Ok tagojn ŝi atakis min per koleraj malestimaj kaj malvarmaj rigardoj.

Sed mi estis kvazaŭ surdmuta. Mi nur ridetis kaj ridetis kiel “Mona Lisa” de Leonardo.

Subite edzino ŝanĝis taktikon. Ŝi kuiris plej malbonajn mangajon, kiujn mia delikatsentema stomako tute malamis. Ŝi volis min malsatigi kiel malamikan fortikaĵon. Sed mi superuzis ŝin. Antaŭ tagmanĝo mi ĉiam nerimarkite malaperis el domo kaj iris en plej proksiman restoracion, kie mi satmanĝis laŭ gusto. Sed edzino post nelonga tempo elspionis ĉion kaj ŝi komencis novan atakon. Ŝi tute mutiĝis. Unuaj tagoj estis por mi tre angoraĵoj. Mi petas, se homo dum dek ok jaroj al kutimiĝis al edzino, kiu multe parolas — ne estas mirinde, ke ĉiu terurigas vidante ŝin paŝadi tra ĉambro, kvazaŭ ŝi estus ia muta, vaska figuro. Sed baldaŭ

mi ankaŭ al tio ĉi al kutimiĝis. Ĉar si nesukcesis, komenciĝis nova taktiko. — Larmoj! Ili fluus fonte kiel rivero Sava post pluvo. Kvar tagojn, tutajn kvar tagojn daŭris tiu ĉi malbona stato. En loĝejo estis jam tiel malseke, ke komencis kreski fungoj. Kaj larmoj senĉese fluus kaj edzino plorsingultis. “Neniam, neniam vi amis min!”

Se guto da akvo ŝtonon traboras — kion do larmoj el bela virina okulo? Mi moligis kiel butero je suno.

“Mi amis vin,” mi fine ekvokis, “mi amas vin kaj mi vin volas ami eterne. Iru kaj alportu al mi bindkravaton! — — — Alportu du bindkravatojn! — — — Alportu dekduon da bindkravatoj — — — Dormu, miaj karaj papilioformaj kravatoj sur altaro de mia amo kaj forbrulu en kameno kiel ŝelo de nukso!”

Edzino ekkaptis min ĉirkaŭ la kolo, kaj ĝojekvokis: “Do vi tamen min amas!”

Posttagmeze mi jam havis bindkravatojn. Edzino montris al mi kiel oni aranĝas nodon. Al mi ŝajnis tio tiel simpla, sed kiam mi mem provis bindi novan kravaton, mi aspektis kiel pendigito, kiu forkuris de pendigilo, havante ankoraŭ ŝnuron sur kolo. Edzino riproĉis, ke mi estas mallertulo kaj al mi ŝajnis, ke mi pli facile povus pace vivi kun eŭropa politiko, sed kravaton aranĝi mi ne sciis. Tiuj monstraĵbindkravatoj kaŭzis, ke mi fariĝis jam nervema. Nenio helpis kaj edzino devis al mi bindkravatojn mem aranĝadi. Post nelonga tempo ŝi komencis ĝemeti: “Ho ve! Kia malbona sorto kun vi, eĉ bindkravaton vi ne scias bindi. — — — Cetere ŝajnas al mi, ke tiuj bindkravatoj al vi tute ne konvenas.”

“Ah ne — male,” mi diris. “Al mi ŝajnas, ke mi iel juniĝis. Antaŭ nelonge diris iu elegante vestita sinjorino al sia amikino en elektra tramveturilo: “Rigardu, kia aminda, ĉarma junulo.” Tio tamen ĝis nun neniam al mi okazis. Jes, bindkravato faras homon pli agrable, pli bela — cetere ĉiu pli bonstata sinjoro portas nun bindkravaton!”

Kiam mi la duan tagon serĉis miajn bindkravatojn, mi ekkonis por mia granda plezuro, ke ili malaperis. Mi demandis do edzinon, kie ili estas.

— “Mi donacis ilin al nia domservisto. Vi estis prava, ke vi tiam ne volis porti bindkravatojn. Portu nun denove viajn malnovajn papilioformajn kravatojn. Ili konvenas al vi multe, multe pli bele.”

Ŝtono defalis de mia koro. Fine mi liberigis min de tiuj malbenitaj bindkravatoj. Nun portas ilin nia domservisto. Lia edzino ĉiam kolere nin rigardas, ĉar ŝia edzo ĉiam ion renversos, kiam li al si aranĝas bindkravaton.

(El serbo-kroata lingvo tradukis A. Ĉech en “La Progreso”).

Marseille (Francujo).

Esperanto Hejmo ĵus malfermiĝis en Marseille, 43 Cours Joseph Thierry, en bela verde kaj blanke pentrinta magazeno, al kiu la atenton altiras du kvinpintaj verdaj steloj.

Gvidata de nia bone konata Samideanino **Roksano**, ĝi celas fariĝi la hejmo de ĉiuj en Marseille loĝantaj aŭ trapasantaj Esperantistoj kaj la centro de la regiona propagando. Tie nun troviĝas la Esperantista Oficejo, kiu antaŭe funkciis en tro malgranda ejo. Plie Esperanto-Hejmo enhavas la delegitejon de U.E.A. kaj la sidejon de la Esperantista grupo de Marseille. La grupan esperantan bibliotekon entenas granda ĉambro, kie ĉiu samideano rajtos senpage legi librojn kaj gazetojn.

Esperanto Hejmo estas ĉiutage kaj tuttage malfermita. Neniu Esperantisto trapasus Marseille'on, ne vizitinte Esperanto — Hejmon.

Dro. Sydney Whitaker.

Nia samideano skribis al amiko Aŭstralia, — Mi ĵus iris en ŝipo proksimume 850 mejlojn laŭlonge de la rivero Amazon. En tiu rivero la pejzaĝo estas tre interesa. Ĉe ambaŭ bordoj la tero estas kovrata per vasta kaj densa arbaro. Sur mia ŝipo mi instruis tri pasaĝerojn esperante. Mi alvenos Londonon post monato. Ĉiam mi esperas reviziti Aŭstralion kaj tie restadi sed ĝis nun ne estis eble. Ju pli mi vojaĝadas despli mi rimarkadas la bezonon de Esperanto. En Brazilio mi ne povis paroli eĉ unu vorton. Ĉiu parolas la portugalan lingvon.

Nia Propagandisto en Europo.

In continuation of his voyage on the Danube, s-ro Hudson writes: The river is here restricted to a width of about 100 yards, and consequently the current is like a mill race. At Turnu Severin train was taken for Bucharest, which was reached at 11 p.m. on the 3rd April. "I got a cab," writes our correspondent, "to drive me to the hotel, which I knew only by name, but it was full, and I had to drive to about 20 others before I could secure accommodation. It was one o'clock when I at length succeeded. Roumania is also a larger country than before the war, and is sadly in need of more buildings, for everyone wants to stay in the big towns." The journey to Lemberg was commenced on 9th April, the route passing through the battlefields where the Russians and the Austrians had such fierce conflicts. Every bridge was destroyed, and the train had to proceed very slowly over improvised structures. Nearly every building in Lemberg is marked by shell-fire. Although only about 450 miles, the trip occupied two days and nights, but, including sleeper accommodation on the train, cost only twenty-five shillings! Krakow was next visited in time to take part in the Polish Esperanto Congress. A stay of two weeks was made here. S-ro Hudson was presented to the mayor at the Town Hall, and was kindly welcomed. "Afterwards," he writes, "I was interviewed by a reporter, to whom I gave an account of my travels, explaining how impossible it would have been to do what I have done without Esperanto. The following day seven papers published the report. From Krakow I went to Warsaw, and afterwards to Lodz and Posen. In Warsaw my visit made quite a stir. I was announced before my arrival, and soon afterwards I was asked to speak at a meeting of the Universal Esperanto Association. There were about fifty members present, including s-ino Zamenhof, the widow of the author of Esperanto. S-ino Zamenhof invited me to afternoon tea at her home. She was very affable, and showed me many of her Esperanto treasures. I think I am

the first Australian who has had the honor of being received by s-ino Zamenhof in her home." Referring back to earlier stages in his travels, s-ro Hudson says: "When in Jerusalem I found that an article in the papers had just been published; as a result I was much questioned about Esperanto. The inquirers were English-speaking Jews, and they asked to be supplied with text books, which they were unable to obtain locally. In Jaffa I met many Esperantists. There is no group, so I asked them to endeavor to start one. The chief difficulty will be in connection with text books, which must be in Hebrew." In another letter he says: "There are many Russians in Constantinople, and mostly they are very poor. I bought newspapers in the streets from a well-known Russian general, and three of the waitresses in a cafe are ladies of rank. Many well educated young ladies, who are able to speak several languages, are selling papers, flowers, etc., in the streets."

A letter from s-ro Hudson, written in London on 7th June, has reached Australia. Our correspondent left Brussels on 31st May by aeroplane, flying over the coastline to Calais and Folkstone, and thence across the Channel to London. The actual crossing of the Channel took only 20 minutes, and the whole trip 2 hours 20 minutes. His visit to England was for the purpose of attending the British Esperanto Congress. This important event is dealt with elsewhere. S-ro Hudson will return to Australia immediately after the XIVth Congress. He has booked his passage on a steamer leaving England on 31st August for Australia, via Panama Canal and New Zealand ports. Our much travelled samideano should be in our midst again during October.

A.E.A. Konsilantaro.

La baloto por elekto de konsilantaro de Aŭstralazia Esperanto-Asocio por la venonta jaro donis la jenat rezulton:—S-ro A. R. Cohen, s-ino R. B. Bigelow, f-ino Maud Helm, s-ro G. Redfern, s-ro C. W. Ballard, s-ro H. V. Tilbury, s-ro H. Byatt.

Maljunaj Arboj.

Multaj homoj ŝatas elserĉadi antikvaĵojn en lando, en muzeoj, la citadelojn, kastelojn kaj aliajn historiajn memorindaĵojn. Mi tre ŝatas la maljunajn memorantojn — centjarajn arbojn. Mi vidas ilin plej ofte en solejoj, kie ili restis kaŝitaj al homa avaremo, aŭ kie konservis ilin estimo de simpla popolo; tiu estimo estas eble la restaĵo de sankta kulto, kiun esprimis al ili niaj prapatroj, kvazaŭ al loĝlokoj de potencaj ekzistadoj kaj spiritoj.

Kio logas min al ili? Ĉu estas tio senvola estimo al la alta aĝo, al la forto, kiu tiomfoje pli longe ol ni kontraŭstaras detruon kaj morton, al ni tiel baldaŭ destinita?

Ĉu estas tio penso pri ĉio, kion memoras tiu muta atestanto kun sia putrigita korpo, sed kun la ĝis nun freŝa, densa foliaro, kiom da fulmotondroj, ventegoj, kiom da frostoj kaj neĝaj blovadoj ĝi travivis, kiom da generacioj dume vivis, ĝojis kaj suferis ĝis ĉio mortis?

Lacigita de la homoj kaj de laboro, mi ŝatas kaŝi min de tempo al tempo en la ombreon de tiuj grandeguloj, kiuj al mi, forkuranta el la homa socio estas plej amataj kunuloj. Ili estas pasinteco, kaj ili tamen ankaŭ vivas.

Ili staru solece en vasta ebenaĵo, en juna arbetaro aŭ en malhela profundajo de vasta arbarego ĉiam ili impresas kaj impresis kompreneman animon.

Kiam la homo ne sciis konstrui kaj volbi kuraĝajn, grandiozajn kupolojn, li havis grandajn, ombrajn arkaĵojn de epokaĝaj arboj.

Poezio de maljunaj arbaretoj, ilia mistera krepusko kaj brueto influis potence je vigla animo parolis kun ili per mistera voĉo de branĉoj kaj ondoj de kie ekflamadis mistika magia lumo de orakolo, tie en la ombro de muskovritaj memorantoj naskiĝis la mitoj eĉ heroaj kantoj.

Mi sidadis sub ili, mi, moderna formiko, por ke mi uzu iliajn trankvilecon kaj solecon; ilia parolo dum epokoj egala, ĉarma, ekzalta, kiu jam al kelkaj generacioj bruetis en la sonĝon kaj revon, kvietigas mian maltrankvilan, malkontentan penson.

Mi aŭskultas, mi rigardas la pejzaĝon aŭ trankvilan arbaron kaj mi pli libere spiras.

Alois Jirasek.

Senfadena Telegrafado por Farmiistoj.

The Amalgamated Wireless Company, (Unuigita Senfadena Telegrafa Kompanio), en kiu la federacia registaro estos la plej multhava akciulo nun traktas pri la importado de granda nombro de senfadenaj ricevilaroj, kun la celo starigi servadon precipe por kampoloĝantoj. La iloj estos luataj al abonantoj sammaniere kiel telefonoj, laŭ ĉiujara lupago. Farmiistoj en la kamparo, same kiel antaŭurbanoj aŭ iu alia kiun la novaĵo allogas, estos regule provizataj de koncertoj, veter- kaj vendejraportoj kaj aliaj eroj de ĝeneralaj informoj. Ne estas nuntempa intenco starigi ian formon de novaĵdistribuo per ĉi tiu servo, sed estonte la projekto estos etendata en sistemon de senfadena telefonado.

La sonorilo sur la preĝejturo Maria-Magdalena en Breslau.

En Breslau vivis fama sonorilfandisto. Li ricevis de la konsilistaro de la urbo la ordonon fandi grandan sonorilon por unu de ambaŭ turoj de la preĝejo Maria-Magdalena. La muldujo el argilo estis finita, la surskriboj kaj bildoj estis fabrikitaj. La metalo ardis en la forno. La majstro estis vokata en la urbdomon. Li estis indigna pri tiu ĝeno, sed li obeis.

Antaŭe li ordonis la lernanton atenti la fajron, sed ne proksimiĝi al la ŝtopilo de la forno. Sed la lernanto enbatis la ŝtopilon kaj rapide fluigis la ardantan metalon en la muldujon. La reveninta majstro mortigis kolege la lernanton, ĉpinante ke li detruis la laboron de tutaj semajnoj. Sed jen! la sonorilo estis bone konstruita.

La majstro sin bone vestis kaj pente li mem sin akuzis antaŭ la juĝistaro. Tiu kondamnis lin je morto. Li aŭskultis trankvile la verdikton kaj nur petis, ke la nova sonorilo estos sonorigata dum sia lasta vojo.

Tiu ĉi deziro estis plenumata kaj de post tiu tempo la sonorilo "Maria" longtempe nur estis sonorigata, kiam estis kondukata kondamnito al la ekzekutejo.

(Tradukis el la germana lingvo, Erich Habellok, en "Esperantista Junularo").

Pri Katoj.

De iu kiu tute ne amas ilin.

Ni ĉiuj havas ĝenajojn; unu el la miaj estas la katoj! En ĉiu ĵurnalo, kiun mi legis lastatempe, mi rimarkis leterojn pri "la ratoj," (pro la pesto), kaj mi demandis al mi, kial oni ne skribas pri la katoj! Mi ne amas la ratojn sed mi devas diri, ke ili ne trudas sin same kiel la katoj; ni povas forgesi ilin kelkfoje, sed mi tute ne povas diri tion pri la katoj, kiuj, same kiel la malriĉuloj, estas ĉiam kun ni. Loĝante en antaŭurbo, kie ĉiuj transloĝantoj forlasas katojn, kaj havante grandan korton ĉe mia domo, kun diversaj arboj en ĝi, mi bedaŭras diri, ke ĉiu hejmmanka kato elektas ĝin kiel bonŝanca loĝejon. Vane mi ĉasas, kaj provas timigi ilin, ili nur grimpas surarbon kaj grimacas al mi kvazaŭ diri, "via bojo estas pli malbona ol via mordo," "vi ne povas timigi nin." Unu el la plej multimemaj ŝajnis unue, ke mi volis ludi kun ĝi, kiam mi provis forpeli ĝin el la korto; fine mi permesis, ke ĝi restu, pensante, ke kredeble, ĝi estas esperantista kato. Alia malbonveninto, estas flavegriza, malbela virkato, kun tute aparta malbona esprimo sur la vizaĝo; ĝi ja havis la dececon ĉiam forkuri kiam ajn mi alproksimiĝis; ĝis foje, oni diris al mi, "via kato ĵus kaptis raton," mi rapidis al la korto, kaj tie sidis kviete, la malbelulo, kun malgranda rato ĉe la piedoj, ĝi fikse rigardis min, kvazaŭ diri triumfe, "jen vi vidas, kiel lerta mi estas, nun vi ne volas ĉasi min," kaj ĝi neniam forkuris denove; tial ĝi ankaŭ restas. Kelke da tagoj post la ratmortigo, mi renkontis la malbelan virkaton sur la strato, kaj je mia surprizo, ĝi havis la maldececon bleki al mi kvazaŭ ni estis la plej bonaj amikoj, kaj marŝi hejmen kun mi; ne havante la kuraĝon de miaj opinioj mi permesis tion! La diversaj katoj estis tiel multenombraj, kaj tiel bruemaj, ke mi ne povis dormi bone, kaj tial suferis de nervmalsano; kaj devis viziti doktoron pri tio. "Nu! kia estas via aflikto? li diris. Mi preskaŭ ekdiris, "katoj," sed sentis, ke li nur respondus, "ratojn," (li estas tre okupata, kaj malpacienca viro) tial mi ekglutis la vorton, kaj diris "maldormemecon" anstataŭ. La doktoro avizis min foriri tuj, por ŝanĝo de aero kaj vidaĵoj. Mi foriris

de Melburno, al parencoj en la kamparo. La unuan nokton mi enlitiĝis frue, kaj endormiĝis preskaŭ tuj, sed ho! ve! baldaŭ terura sono vekis min (leginte tiom multe pri Irlando en la ĵurnaloj lastatempe) murmuris al mi mem, tre certe estas "banshees" (Irlandaj fantomoj), sed mi poste rekonis la bonekonatajn bruojn, ja estis la kamparaj katoj, tiel same bruemaj kaj saĝne multenombraj kiel la urbaj! Nu, mi pensis, tute ne estas eble eviti la sorton; kiel la poeto diras, — "ĉar tiuĉi estas skribita, kaj devas esti" k.t.p. Estas iom kurioze, ĉu ne, ke mi preskaŭ tuj sentis min pli sana, eltrovinte, miaj parencoj ankaŭ havas ĝenajojn! Post kelke da monatoj, mi revenis hejmen, kaj sur la sojlo estis granda nigra kato por bonvenigi min, mi estis ŝtoniĝinta, kredu al mi, mi tute ne havas esperantajn vortojn priskribi miajn sentojn! Kiam mi rekonsciĝis mi aŭdis, ke la domanoj gratulas min pro tio ke tia bela nigra kato venis tute volonte, loĝi en la domo dum mia foresto! "Kiel feliĉe; nigra kato estas tiom bonŝanca," ili diris. Poste, kiam neniu krom la nigrulo rigardis min, mi provis forĉasi ĝin, sed neniam plu; mi tre bedaŭras diri, ke ĝi faligis min, pro tio, ke ĝi tute ne forkuris, kiel mi atendis, kaj mi efektive "mordis la teron." Ĝi ankoraŭ restas en la domo, kaj tute rifuzas esti ofendita. Kredeble mi iam amos ĝin. Amikino vizitis min antaŭ nelonge, kaj diris, "mi havas belan donacon por vi," mi tre interesiĝis, ĝis kiam ŝi klarigis, ke tio estas bela, blanka, persa katido; mi preskaŭ ŝvenis, sed diris firme, ke troviĝas tiom da katoj en la korto, ke ili plej certe tuj formanĝus katidon. Nu! mi konvinkiĝis, ke la katoj estas unu el miaj krucoj, kaj mi devas porti ĝin ĝis la fino.

Emo.

Press Mention.

The Sydney Press is increasingly sympathetic towards Esperanto. During the last week or two articles have appeared in the **Australasian Manufacturer**, **The Australian Highway**, (the journal of the Workers Educational Association), the **Cumberland Times**, **Sydney Morning Herald**, **Daily Mail** and **Sparks Fortnightly**. The **Cumberland Times**, **Sparks Fortnightly** and **Highway**

published the "Manifesto to Teachers" in full. **Sparks** **Fortnightly** is a paper devoted to "Constructive Thought, Creative Ideals and the Advancement of Australia." The issue of 12th August gives the pride of place to an article entitled "The Power of Esperanto," and it is followed by "A Message to Esperanto Societies in all other Countries." This appears in both Esperanto and English. The Esperanto version was prepared by s-ro John Jolliffe. This is the message:—

Mesag'o Al Esperantaj Societoj En Ĉiuj Aliaj Landoj.

Goje tiu ĉi ĵurnalo eletendas manon de frateco trans mondon de milito lacigitan. Tie ĉi en nia propra lando ni penas fari iom por instrui amon kaj kunulecon kontraŭe al malamo kaj suspekto. Tiu ĉi ĵurnalo klopodas ankaŭ, laŭ ekonomia vidpunkto, montri la politikajn kaŭzojn de la milito. Ni portas mesaĝon en ĉiujn hejmojn atingeblajn, kriante, amu unu la alian, pardonu unu la alian, komprenu unu la alian. Kaj ni deziras iri ankoraŭ pli malproksimen. Tial ni sendas tiun ĉi mesaĝon, vibrantan de bonvolo, al ĉiuj en ĉiu lando:—

"Esperanto floru, ĝi estu amata de niaj infanoj, ĝi montriĝu la plej certa rimedo por instrui tutmondan fratecon."

Se la energio nun malsaĝe uzata enplantante en la mensojn de nesciaj infanoj ideojn pri afekta Nacia fiero estus konsumita instruante Esperanton kaj la fakton ke kio malutilas al unu tio malutilas al ĉiuj, kiom grandegan progreson farus la mondo al paco. Ni ne rekomendas dum momento alian ol tio ke infanoj amu la hejmlandon, sed ne necese sekvas el tio ke ili devu malami aŭ malestimati alian landon. Ĝi ne signifas ke fiereco pri ies hejmo estigu suspekton kontraŭ najbara hejmo. Kaj plue, kiam Esperanto estas komprenita, kiaj perspektivoj estas atingitaj plene videblaj. Eĉ la spirito de tiuj instruantaj ĝin disvastiĝas, ĉar tiaj instruantaj ankaŭ devus diri kial ĉi tiu lingvo estas instruata. Ni kredas ke potenca stimulo devus naskiĝi por saltege antaŭenporti tiun ĉi grandan idealon. Tiuj el ni pligrandanimaj ol landlimaj, pli larĝanimaj ol la frenezeco de falsa patriotismo,

pli belaj ol egoismo devas labori kiel neniam antaŭe. Do ni kunigu la manojn kaj laboru. Por montri kiel praktikaj ni estas ni sendas tiun ĉi mallongan mesaĝon al vi, kaj petas ke vi resendu al ni mesaĝon kiun ni publikigos. Ĉar tiu ĉi ĵurnalo iras tute tra la longon kaj larĝon de tiu ĉi lando, tia peno montras la belan senton vivantan, kaj ĝi kreskos. Salutojn al vi en aliaj landoj. Amon al vi en aliaj landoj, pacon al vi en aliaj landoj, kaj sciuj tion ĉi, troviĝas tiuj tie ĉi en malproksima Aŭstralio klopodantaj al mondpaco kaj pretaj oferi multon por tratranci la vojeton kondukantan tien.

Viaĝ en la nomo de la suferanta homaro,

Fajreroj Duonmonate.

In **Sparks** the Esperanto movement has a powerful ally, and we hopefully look forward to the time when it will have the necessary diacritical type and may be induced to publish some Esperanto matter in each issue. The organiser of the forthcoming congress will have to be wary or he will have publicity thrust upon him by being interviewed by this enterprising journal.

Novaj Gazetoj.

Teristo, monata bulteno dediĉita al serĉado de vojoj celantaj al la realigo de vivo justa kaj harmonia. — Moskvo, poŝtkesto 663, Stanisl. Szabuniewicz, Jarabono 1 dolaro.

Terismo (Stanisl. Szabuniewicz): "Ĉiu homo devas ĝui egalajn rajtojn je la tero, ĉiu homo devas ĝui egalajn jurajn rajtojn. Vivo sana, justa, harmonia estas ebla nur en intima kontakto de la homo kun la tero, kun la naturo. Por povi vivi juste kaj libere la homo devas rezigni je superfluaĵoj."

Sveda Laborista Esperantisto, Gefle. Eliros monate. Redaktata en esperanta kaj sveda lingvoj. Prezo 15 ore. Celas "agiti esperanton inter la svedaj laboristoj."

Aŭstria Esperanto-Raporto, Wien VI, Mollardgasse 55. Redaktata esperante kaj germane. Celas raportoj pri la aŭstria esperantista movado al eksterlandanoj; kaj estos eldonata laŭ bezono, sed almenaŭ 6-foje dum la jaro. Anstataŭas la gazeton, "Nova Tempo," kiu devas ĉesi pro la alta kosto de presado.

Lithora Rakonto Por La Infanoj.

Vilĉjo sidis kaŭre sur la fenestra sidloko rigardante la pluvon.

Li estis tre malgaja pro tio, ke la tago estas lia naskotago, kaj oni donacis al li tion, al kio, en la tuta mondo, li pleje sopiris — novan piedpilkon.

Sed por kio taŭgas naskotaga datreveno kune kun reala piedpilk, kiam pluvos senĉese — ne tia pluvo, kia falas nur dum iom da tempo, kaj poste lasas ekbrili la sunon, sed tia terura, mallaŭta, ensorbiga speco, kiu daŭras la tutan tagon, kaj eĉ tute ne intencas ĉesi.

— Ho, — fine kriis Vilĉjo — Mi estas enuigita pro ĉio, mi malamas la teruran pluvaĉon; ho, kiel — mi — malamas — la — teruran — pluvaĉon.

Sed kio estas tiu ĉi eksterordinara okazajo? La islandaj papavoj estis ĉiuj marŝantaj el la bedo, kaj enirantaj rekte tra la pluvo kaj la fermita fenestro. Vilĉjo estis tute certa, ke la fenestro estis fermita, alie, ne estis eble, ke li povus kaŭriĝi sur la kusenoj sur la fenestra sidloko.

— Nu, — ĉiuj samtempe diris la papavoj, — kiamaniere ni lin punos?

Sajne neniu sciis, kaj sekvis grava argumento.

— Nu — diris unu papavo — ĝi devos esti io sufiĉe severa. Ĝis nun, dum mia vivo, mi neniam aŭdis ion tiel malbonan.

— Imagu al vi, li nomis la pluvon "pluvaĉo" — diris dua papavo, — cetere, tian belan mallautan pluvon, ne tian specon, kiu bategas kaj difektas nin.

— Kaj pripensu tiujn kompatindajn anglajn kampajn ranukolojn en la angulo — aldonis tria, — ili efektive sopiregas al pluvo, ili bezonas tion da ĝi. Unu el ili sciigis min, antaŭ du aŭ tri tagoj, ke, se pluvo ne baldaŭ falos, ili ne estos pretaj ekflori en la printempo. Jam nun ili ĝojadas dum la tuta tago, kompatindaj karuloj.

— Ho, — ekkriis ĉiuj kune, — li estas malbona knabeto, ni mortigu lin!

— Ne, — kriis Vilĉjo, — ho, mi petas, mi petas, ne

— Kiel! Vilĉjo kara, estas la temanga horo, kaj jen vi estas dormanta. Kaj Vilĉjo malfermis la

okulojn, kaj vidis la patrinon rigardantan lin.

— Ho — li ekspiris, "vi venis ĝustatempe, patrino, la islandaj papavoj estis mortontaj min, ĉar mi diris

— Mi pensas, ke vi estas songinta Vilĉjo kara — diris la patrino klianante sin por kisi lin.

(From the Women's page of the "Herald." Tradukis M.P.).

La Kreskigado de Kotono en Aŭstralio.

En Aŭstralio troviĝas kvindek milionoj da akroj, kiujn oni povus ŝanĝi el neuzita soleco en riĉegon per la kreskigado de kotono. La eblo estas grandegaj. Industrie ĝi donus tiun progreson al enmigrado kaj landokupado, por kiu la federacia kaj ŝtataj registaroj longe serĉis. En la venonta jaro estos 50,000 akroj plantitaj per kotono en Kvinslando kaj en la ceteraj ŝtatoj la tero dediĉita al kotona plantado estos de pli granda areo, ol antaŭe. Estas pruvite, ke la planto prosperas en Nova Suda Kimrujo, en la nordokcidentaj regionoj de Viktorio, laŭ la rivero Murray en Suda Aŭstralio, de Wyndham ĝis Albany en Okcidenta Aŭstralio kaj en la Norda Teritorio. Spertuloj atestas, ke la kotono el la valo de la Murray estas de tia kvalito, kiu farus avidaj la Lankaŝiraj aĉetontoj, kaj ke ĝi valoras almenaŭ du ŝilingojn po funto, kiam la Amerika kotono valoras nur unu ŝilingon kaj ses pencojn. Sindikato estas akirinta 77½ kvadratajn mejlojn da tero en la Norda Teritorio, ĉirkaŭ 80 mejlojn malproksimajn de Darwin, kaj nun penas kolekti la necesan kapitalon. Kotona kreskigado donos al la neriĉulo grandan oportunan okazon. En la lasta rikolto, areo de 100 akroj de senzorge plantita kotono en Kvinslando, redonis al la kreskiganto £1500. Alia terpeco da 3 akroj produktis la remarkindan sumon da £112. Oni povus citi multajn ekzemplojn de multgajno el malgrandaj areoj. La Aŭstraliaj Kreskigantoj de Kotono Unuigitaj atendas trakti 3000 tunojn da kotono ĉi tiun jaron. Oni atendas malgrandan rikolton en Ameriko, pro la detruoj de la koton-manĝanta vermeto. Ĉi tiu donos al Aŭstralio grandan oportunan okazon.

Pri logebleco sur la planedo Mars.

Jam ĉiu vidis la ruĝan stelon, la planedon Mars; ĝi estas multe pli malgranda, ol nia terglobo. La unua marskarto estis desegnata de Amerikano Hull en la deksepa jarcento. La estro de la Observatorio en Mailand (Milano, Italujo) profesoro Schiaparelli traesploris la planedon en la jaroj 1877-1888. Se oni rigardas karton desegnititan de Schiaparelli, oni tuj vidas du grandajn, blankajn lokojn, kiuj troviĝas sur la polusoj. Tio estas sendube polusneĝo. Oni povas ankaŭ ekkoni, ke parto de ĉi tiu neĝo fluidiĝas, kiam Mars havas someron. Tiam oni vidas, ke la polusoj plimalgrandiĝas. Oni ankaŭ konstatis ke la planedo havas pluvon kaj neĝon, matenruĝon, kaj vesperkrepuskon, fulmotondron kaj nebulon. Ankaŭ atmosfero tie ekzistas, sed ĝi estas trioble pli maldensa, ol la atmosfero de nia tero. Sed la plej grava kurioza afero sur Mars estas la kanaloj. Ili kontrigis kiel amaso da larĝaj linioj, kiuj estas precize rektaj, keĵ kiuj same kiel la maroj sur Mars, estas blu-verdaj en kontrasto je la lando, kiu estas ruĝet-flava. Nun ni volas pristudi la problemon de la logebleco. Se ni pripensas ĝin ni devas diri: Jes, la planedo estas loĝata! La ĉefkondiĉoj de l' vivo ekzistas: aero, akvo kaj tero. Ni povas ankaŭ aserti, ke la Marshomoj jam estas pli civilizitaj ol ni, ter loĝantoj, ĉar Mars estas ja multe pli malnova ol nia planedo, konstruojn oni kompreneble ne povas distingi. Kelkaj astronomiistoj asertas, ke la Marshomoj mem konstruis la kanalojn por provizi per akvo la landon. Sed, ĉar la kanaloj estas larĝa-30-300 kilometrojn, kelkaj astronomiistoj diris, ke ĉi tiuj estas nur kuŝantaj lokoj kiuj kunfluigas en la mikroskopo. Aliaj opinias, ke la marslando estas dezerto kaj la kanaloj estas vegetadlinioj, kiuj kontraste je la dezerto

estas malhelaj. Sed ĉi tiu hipotezo estas malĝusta, ĉar la kanaloj duobligas dum la neĝfandiĝo. Estas eble, ke tiuj estas akvokanaloj kuŝantaj pli altaj ol la aliaj, kaj, ke ili nur estas uzataj kiam estas multe da akvo. Tial ni povas certigi, ke ekzistas Marshomoj, kaj ĉar ili estas pli civilizitaj ol ni, troviĝas tie, supozeble nur unu regno kaj nur unu lingvo. Ili ankaŭ uzas la "sun energion" t. e. forton ricevitan per la ŝanĝado de sunvarmeco.

Tial estas interkompreniĝo kun ĉi tiu planedo por nia civilizacio gravega, kaj se sukcesus al niaj astronomiistoj kaj ingenieroj ĝin funkciigi kun Mars, tiam komencus tiu epoko por la homaro, kiun ni helpas prepari per nia kara lingvo kaj per la ideo interna de Esperanto: la paco eterna!

(Aleks. Hirseman, en "Esperanto Junularo").

Wireless Telegraphy and Esperanto.

A message from French amateurs to English amateurs is contained in a letter from Dr. Pierre Corret, editor of La T.S.F. Moderne, Vice-President of La Societe Francaise d'Etude de Telegraphie et de Telephonie sans fil, recently published in "The Wireless World and Radio Review."

..... Still another difficulty we foresee, namely, the barrier of language. What language shall be used by British and French amateurs, who do not know each others' tongue? What will be the use of words reaching us from across the channel, if we do not understand them? This difficulty has been made clearly evident to you in the announcement, in French, of the names of items in the Telephonic Concerts from the Eiffel Tower. Happily a simple solution exists: we shall be able to use the very easily acquired international language, Esperanto.

Possibly you wonder that I, a

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Frenchman, write so well in English; yet I do not know your language at all. I can to some extent guess at its meaning when reading it, but I am quite unable to write it. This friendly message I have written to you in Esperanto without difficulty, and its text has been translated into English by a British Esperantist. I am absolutely certain that he has transmitted my thoughts to you far more accurately than could have been done by a Frenchman with a "good knowledge" of English, or by an Englishman with a "good knowledge" of French.

As a preliminary test in this direction, La T.S.F. Moderne will use Esperanto for items of general information transmitted to its private correspondent.

Proksime de Chicago apud la Michiganlago la bahaĵoj konstruadas grandegan templon, kiu estos malfermata al ĉiuj religianoj de kiu ajn kredo kaj estos dediĉata al la sendependa esplorado de l'vero, al la unuigo de dio kaj homaro, al la harmoniigo de scienco kaj religio kaj al la akcelado de universalaj religio kaj paco.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—A. Costigurat, £4/5/-; J. Girdwood, 4/6; F. T. Bury, 4/6; G. Collingridge, 4/6; T. Tree, 5/-; F. T. Simon, £3/10/-; L. Fosto, 6/-; W. J. Lawrence, 5/-; H. Thomson, 10/-; A. Ryan, 4/6; P. Abbott, 4/6; E. J. Cox, 4/6; G. Meyer, 12/-; T. Doran, 5/-; F. Effer, 4/6; M. N. Guell, 7/-; L. A. Miller, 4/6; A. M. Hopton, 4/6; Sale of Gifts, A.E.A., Melb., £3/1/4; W. R. Browning, 4/9; — Hepworth, 4/6; C. M. Hannaford, 4/6; G. Geneff, 4/2; J. F. Downey,

5/-; W. D. Smith, 4/6; E. A. Budge, 10/-.

W. J. Baltzer, 10/-; A. E. M. Beatty, 10/-; J. Harrison, 5/-; H. M. Leighton, 4/6; A. Saar, 4/6; L. Steitz, 4/6; — Casey, 4/6; — Chertrett, 4/6; C. Caine, 4/6; K. Simmons, 4/6; — Batchelor, 4/6; E. Heritage, 4/6; D. Guilbert, 4/6; W. T. Middleborough, 4/6; F. Balicek, 5/-; J. Vadanovich, 7/6; E. A. Sinnotte, 4/6; T. McVea, 4/6; H. C. McKerrow, 7/6; B. Hollow, 4/6; Pyke's Book Shop, 3/-; J. F. Hills, 4/6; I. James, 5/-; A. J. Doyle, 5/-; J. Edmonds, 4/6; T. E. O'Donoghue, 5/-; — Irwin, 4/6.

Ĉi tiu listo estas ĝis 8 septembro Multaj abonoj ankoraŭ restas pagoblaj!

S-ro Manuel Noelle Guell, ĉefinstruisto, General Arenales, F.C.P., Argentino, S. Ameriko, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj letere aŭ il-poŝtkarte. Interŝanĝas p.m., gazetojn, ktp. Ĉiam tuŝ respondos.

S-ro Arkadio Kostanov, Katolicekaja, 5, Astrahan, Rusujo, deziras korespondi kun neeŭropanoj pri esp. mov., vivkondiĉoj, naturo, moro, ktp. Interŝanĝas poŝtmarkojn, (havas rusajn kaj persajn), Il. p.k. (vidaĵojn, tipojn,) papermonon. (havas la sovjetajn) kaj esperantajn ĵurnalojn aŭ libretojn. Al ĉiuj li certe respondos.

S-ro L. M. Glynn, "Knapp Cottage," Sturt st., Townsville, Queensland, L. Pk. Ĉiaj temoj, kun ĉiuj landoj.

S-ro J. Sharples, Bootmaker, Flinders st., West Townsville, Queensland, L. Pk. Ĉiaj temoj, kun ĉiuj landoj.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow" Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association.
Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by
Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.